La demando pri sencohavaj numeraloj

Responde al la legantoletero de s-ro *Haĝiev* (SR 3/2009, p. 186): En PIV estas klara vortigo per la sufikso -iliono: duiliono = 10^{12}, mil duiliono 10^{15}, triiliono = 10^{18}. Ne necesas reinventi la radon.

La klimata pintkunveno

en Kopenhago, ne solvinta la trovarmigon de nia atmosfero, apenaŭ finiĝis kaj jen Panjo Naturo pensigas pri nova glaciepoko. Mia demando al la fakularo estas: Ĉu la jam longe nekutiman malvarmon kaŭzis la rapide fandiĝanta glaciamaso lastatempe amase fandiĝanta suden el Gronlando, Spicbergo k.s.? Iel tiu amasego ja devus efiki al la natura ekvilibro en la Atlanta cirkula fluego. Kompreneble rezistas la jama temperaturo, do ankaŭ la nuna plivarmiĝo kun ŝanceliĝoj ŝajne ne malpravigas la tezon.

Komento pri Monda ekonomia krizo: kiel ĝin solvi

Niaj grandentreprenistoj forŝovis la produktadon de unuaj vivbezonoj al triamondaj landoj kun malaltaj salajroj kaj longaj labortagoj. Por la delonge industriigitaj landoj restas luks-industrioj, eble eĉ ekspluataj el la krudmateriala havaĵo de pastaj generacioj, kaj pli poluaj. Senskrupula subpremada tradicio en la tria mondo favoris rezignacion inter la labor-elĉerpaj amasoj. Tamen la homaj rajtoj implicas egaligi la vivŝancojn: ankaŭ triamondanoj rajtu je indaj vivocirkonstancoj, sanasekuro: tio altiĝos salajrokostojn. Tiel reekvilibriĝos la monda ekonomio kun loka produktado de vivbezonaĵoj kaj malpliaj transportaj energia disipado kaj poluado.

Rob Moerbeek
Zwaansmeerstraat 48, NL – 1946 AE Beverswijk, Nederlando
<r.moerbeek@wanadoo.nl>

Dankon pro SR 1/2010 kaj SR 2/2010, kiujn mi tralegis kun granda ĝuo, do almenaŭ tiujn artikolojn, kiuj estas facile legeblaj. Bedaŭrinde mi konstatis, ke la artikoloj en Geologio Internacia-11 estas tro fakaj kaj tial ne tro allogaj por mi, sed viaj artikoloj, ĉu "Ŝtonoj el Adriatiko", ĉu "Geniulo vastvida" pri *Kepler*, estas vere bone kompreneblaj kaj interesaj ankaŭ por simpla leganto kiel mi. La Esperanta formo "Keplero" tamen ne plaĉas al mi, ĝi estas por mi ŝulcismo*.

En la dua numero altiris min la artikolo de *Dominique Vieira* pri keltoj, ĉar keltoj iam vivis ankaŭ sur nia teritorio. Almenaŭ konfirmas tion arĥeologiaj trovaĵoj kaj ankaŭ la nomo de nia lando "Bohemio", laŭ la keltoj *"Boioj"* (latinlingvanoj ĝin nomis "*Boi*-hejmoj" = Bohemio).

Jiři Patera
u Ryšánky 1534/21, CZ 147-00 Praha 4 / Ĉeĥio

* "Keplero" troviĝas en la nova PIV (2002, p.549) – bonaj nomformoj ne ĉiam estas ŝulcismaj.

Scienca eĥo

Fonto de la scienceĥaĵoj: la datoj (en krampoj) estas la cititaj ŝirfolioj de *Brockhaus*-kalendaro "Kion tiel ne diras la leksikono"

Ĉu adiaŭo al korkŝtopilo?

Fakte jam ekzistas, cele de longdaŭra fermado de vinboteloj, multaj alternativoj por la altvalora naturproduktaĵo "korko". La plej bonajn fizikajn proprecojn la fakuloj atribuas al la ŝraŭbfermiloj: tiuj estas nevenkeble malmultekostaj, fermas absolute hermetike kaj evitas fremdguston. Speciale alloga kaj valora estas la longa kapsulo kun longa ŝraŭbkanelo – elstaraj vinfaristoj nuntempe uzas ĝin ankaŭ por pintaj vinoj (kaj tio estas utila por la ĝenerala akcepto de tiu ĉi porbotela fermilspeco).

Laŭspertaj empirioj jam delonge ekzistas: prov-vinoj de la Esplorinstituo *Geisenheim*/Germanio jam ekde 35 jaroj estas fermataj per tiuspecaj turnfermiloj. Same bonkvalita – sed pli kosta ol la plej bona korkŝtopilo – estas la "rustrezista ŝtalfermilo" (*"Stainless Steel Cap"*) farita el "nobla ŝtalo", kiu garantias por la vino nekredeble longan vartenejan stokadotempon, sen ke tiu pliaĝiĝas – vivaj vinoj restas vivaj. Pintgastronomoj taksas tiun econ pozitive, sed optike ĝi ankoraŭ bezonas alkutimiĝon.



(1) (2) (3) (4)

Bildo 1: Bonkvalita, sed kosta: la korko
Bildo 2: La longa kapsulo protektas ankaŭ unuaklasajn vinojn
Bildo 3: Sraŭbfermilo estas la plej malmultekosta
Bildo 4: Nobla novulo: ŝtopilo el vitro

Aliflanke la afero por *"Vino-Lok"* ne estas tiom malbona. Antaŭ 5 jaroj tiu ĉi nova gustoneŭtrala vitrofermilo estis surmerkatigita; enkonstruita sintezmateriala ringo garantias hermetikan fermon kaj pro tiu ŝtopgarnaĵo la botelo estas denove fermebla – tamen sufiĉe kosta por la vinproduktanto, ĉar li devas aĉeti, aldone al tiuj